# Ludreguloj

# FRAZADO


Ludo por 2 ĝis 8 ludantoj

**Materialo:**
168 kartoj el 5 kategorioj:
- 24 verboj,
- 48 substantivoj kaj pronomoj,
- 24 adjektivoj,
- 48 ligitaj vortetoj,
- 24 akuzativaj kaj pluralaj finaĵoj.




**La Ludocelo:**
Celas konstrui frazojn.

**Antaŭ la ludo:**
Meze la tablo, stakigu dorsflanke la kartojn je 5 stakoj laŭ la kategorioj.



**Por ludi:**
La unua ludanto elprenas 7 kartojn el la stakoj (minimume unu verban karton). Li konstruas frazon, uzante la plej multe da kartoj.
Ekzemplo:




Per tiuj 7 kartoj, la ludanto konstruas la ĉi-suban frazon kaj li lasas 2 kartojn.




La frazo konsistas el 5 kartoj, sekve la ludanto akiras 5 poentojn. La 5 uzitaj kartoj estas metitaj flanken. La sekvanta ludanto heredas la ceterajn kartojn, do laŭ ĉi-tiu ekzemplo. Li elprenas nur 5 kartojn po disponi je 7 kartoj.

Kaze de iu kiu ne sukcesas fari frazon pere de la 7 kartoj, li rajtas elpreni pli da kartoj sed li ricevos sankcie minus unu poenton por ĉiu plia karto.

La ludantoj ludas laŭvice. La ludo ĉesas je la elĉerpiĝo de unu el la 5 kartostakoj.

**Fino de la partio:**
La ludanto kiu akiras la plej multe da poentoj gajnas.

Aŭtorino: Isabelle Saulnier.
http://ludoj.neowordpress.fr